



IPR

Driemaandelijks tijdschrift
Afgiftekantoor: Antwerpen X. ISSN 1013-2031
Jarkolekto 51 - trimonata
21/1

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Redakta komitato:

József Németh (red.)
Mireille Grosjean
Luigia Oberrauch Madella
Ahmad Reza Mamduhi
Rob Moerbeek

Kunlaborantoj de la aktuala numero:

Davide Astori
Ariadna García Gutiérrez
Mireille Grosjean
Povilas Jegorovas
Ilona Koutny
Stefan MacGill
Burghelea Manuela
Joel Muhire
Maria Nazaré Laroca
Radojica Petrovič
Germain Pirlot
Martin Ptasinski
Honoré Sebuho
Semio
Julia Sigmond (+)
Szilvási László



ilei

Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj





ENHAVO

Enkonduko (Mireille GROSJEAN)	3
Davide ASTORI: <i>Interlingvistiko kaj Esperantologio [...]</i>	4
Rezolucio de MondaFest', kunverkita de la laborteamo pri la festivala temo	11
Ariadna GARCÍA GUTIÉRREZ: <i>Interkulturaj valoroj de Esperanto [...]</i>	12
Mireille GROSJEAN: <i>SAT fondiĝis antaŭ cent jaroj</i>	14
Mireille GROSJEAN: <i>WIKIPEDIA dudekjara</i>	15
El la landoj kaj sekcioj (GB, CN, DE, IT, LT, PL)	17
Pri Zamenhofaj Festoj la 15-an de decembro	21
Anoncoj	25
Lerni la ciferecon kaj lerni ciferece (Germain PIRLOT)	26
Landaj gravajoj kaj laboroj farendaj kaj farataj (Stefan MACGILL)	27
Ni kongresumos en Benino de la 7-a ĝis la 14-a de aŭgusto 2021 (M.GROSJEAN)	29
Simpozia alvoko (Radojica PETROVIĆ)	34
Informoj pri ILEI, redakciaj informoj, adresaroj de funkciuloj	36

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto: Mireille GROSJEAN „Mirejo”, Grand-rue 9, cp 9, CH-2416 Les Brenets, Svislando. <mirejo.mireille@gmail.com>. Tel. hejma (+41) 32 932 18 88, portebla (+41) 79 69 709 66. Kunordiganto de la estrara laboro. Eksteraj rilatoj (UNESKO, FIPLV kaj aliaj). Informado pri la Ligo. Observanto de ILEI en la estraro de UEA kaj Komitatano A ĉe UEA. Eldonado de la du revuoj de ILEI.

Vicprezidanto: Ivan COLLING, DEPAC/UFPR, Ed. Dom Pedro I, Rua Gal. Carneiro, 560, Primeiro. Andar, Centro, BR-80060-150, Curitiba, PR, Brazilo. <iecolling@yahoo.com.br>. Eldonado de la Manlibro pri Instruado de Esperanto

Sekretario: Elena NADIKOVA, ul. Kadikova, 24-41, RU-428037 Ĉeboksari, Rusio, Tel. fiksa: (+7) 8352-648531, portebla: (+7) 919-670-25-34. <lena_espero@mail.ru>.

Estrarano pri financaj aferoj: William HARRIS „Vilĉjo”, 4 Edgecomb Ct, Portland ME 04013, Usono. <ilei.kasisto@gmail.com>. Tel. hejma (+ 510) 653 0998.

Vic-prizorganto de financaj aferoj: Karine ARAKELJAN, 33 Khandjian Str., Apt. 4, AM-0010 Erevan, Armenio, Tel. poŝ.: (+374) 055-27-99-06. <karinko_arm@mail.ru>

Estrarano: JUNG Yuro „Unika”, 101, Bonuru-Musashi, 9-11, Asahicyou 3, Kawagoe, Saitama JP-3501126, Japanio. Tel. poŝ.: (+81) 70-5569-6771. <yurjun@st.amu.edu.pl>. Reta komunikado, kongresaj aferoj, TEJO.

Estrarano: Radojica PETROVIĆ, Bul. oslobodjenja 36/14, RS-32000 Čačak, Serbio. Tel. hejma (+381) 32 371053. <radojica.petrovic.rs@gmail.com>. Universitata agado, Eŭropa komisiono de UEA, AEDE.





Scienca Komitato

Prezidanto: Humphrey Tonkin,
Usono, University of Hartford;
AdE¹

Membroj:

Duncan Charters, Usono, Principia
College, Elsah

Renato Corsetti, Britio/Italio,
Università degli Studi di Roma
„La Sapienza”; AdE¹

Probal Dasgupta, Barato, emerita
profesoro de LRU, Indian
Statistical Institute, Kolkata; AdE¹

Aloyzas Gudavičius, Litovio,
Šiaulių universitetas

Boris Kolker, Usono; AdE¹

Ilona Koutny, Pollando/ Hungario,
Uniwersytet im. Adama
Mickiewicza w Poznaniu

Stefan MacGill, Nov-Zelando/
Hungario

Aleksandr Melnikov, Rusio,
Академия Сельскохозяй-
ственного Машиностроения,
AdE¹

Radojica Petrović, Serbio,
Univerzitet u Kragujevcu

Balázs Wacha, Hungario, MTA
Nyelvtudományi Intézet

¹ AdE – Akademio de Esperanto

Sur la titolpaĝo: JoCa, nia
kongresejo en Kotonuo, Benino
(vd p. 29)

Sur la dorskovrilo: Novaĵoj el
Zaozhuang, Ĉinio (vd p. 18)

Enkonduko

Karaj legantoj,

Atentu! Atentu! Ne flugu al Skotlando,
sed flugu al Benino!

La Estraro de ILEI ĉirkaŭiris la pre-
parojn por la hibrida 54-a Kongreso de
julio 2021, diskutis, pripensis, argumen-
tis.... kaj esploris pri loko sen pan-
demio. Aŭdante tion mi proponis
Beninon, klarigis pri la situacio, pri la
ebloj, kaj la Estraro konvinkiĝis, ke
kelkaj samideanoj povus emi flugi al
Kotonuo. Novaj datoj aperis: ekde la 7-a
ĝis la 14-a de aŭgusto. Ni volas aŭdi pri
intencoj de personoj, kiuj volas veni al
Benino, tiuj deklaroj pri intenco atingu
la Estraron ĝis la fino de majo; tiam
estos decido, ĉu okazos fizika kunveno
en la hotelo JoCa aŭ ne. Se temos pri sep
aŭ ok personoj, ni nuligos la surlokan
kongreson kaj ĉiuj komprenos tiun
decidon. Ĉiukaze, la virtuala versio de la
evento certe okazos, aŭ sola aŭ kune kun
la ĉeesta.

Mi kreis kaj kompletigas regule ĉapitron
sur mia blogo kun multaj detaloj kaj
helpaj indikoj.

Ni tre esperas, ke grupo el vi ĝuos inter-
nacion kongresan etoson en Kotonuo en
aŭgusto.

Pliaj informoj pri tiu evento troviĝas sur
paĝoj 29-34.

Elkore salutas vin el Kotonuo

Mireille Grosjean

Prezidanto de ILEI





Interlingvistiko kaj Esperantologio en la nuntempa itala universitata medio

(kun speciala fokuso al la Universitato de Parmo)

de Davide ASTORI (Italio)

Resumo. Tiu ĉi prelego celas prezenti la situacion de la instruado de ‘Interlingvistiko’ kaj ‘Esperantologio’ en la nuntempa itala medio, specife fokusante la agadon ĉe la Universitato de Parmo, hodiaŭ, post la bedaŭrinda fino de la Torina sperto, la sola, kiu montras aktivan kaj specifan atenton al la fako: inter la diversaj kursoj, ne malofte spaco estas destinita al interlingvistiko, kaj dum la lastaj jaroj apartaj tagoj estis dediĉitaj al specifaj temoj; en la jaro 2019a festis sian dekjariĝon la ‘Premio „G. Canuto” por magistriĝa disertacio pri ‘Interlingvistiko kaj Esperantologio’; kaj ekde 2020 eĉ disponigatas sendependa kurso pri ‘Interlingvistiko’.

Ŝlosilvortoj: Universitato de Parmo (Italio), esperantlingva kurso pri ‘Ĝenerala Lingvistiko’, oficiala kurso pri ‘Interlingvistiko’, Premio „G. Canuto” por magistriĝa disertacio pri Interlingvistiko kaj Esperantologio, universitata studenta Grupo ‘Segni’.

1 Interlingvistiko ene de la itala Akademio

La interlingvistika tradicio en la Itala Akademio longas, kiel majstre resumita de Fabrizio PENNACCHIETTI:

En Italio la antaŭuloj de interlingvistiko estis du eminentaj anoj de *Accademia Nazionale dei Lincei*: Graziadio Isaia Ascoli (1829-1907), la fondinto de lingvistiko en Italio, la unua titolulo de katedro pri glotologio, en 1860 ĉe *Accademia Scientifico-Letteraria* de Milano¹ (li mem forĝis la terminon ‘glottologia’) kaj aŭtoro, interalie, de pazigrafio por telegrafa komunikado, la *Pasitelegrafia* (1851); kaj Giuseppe Peano (1858-1933), renoma matematikisto kaj logikisto, kiu, fascinita de la Lejbница idealo de universala lingvo, evoluigis sian *Latino sine flexione* (1903), lingvon por scienca komunikado ellaboritan per simpligado de la latina gramatiko kaj forigado de ĝiaj neregulaj formoj. Krom interlingvistiko en ĝenerala senco, en Italio pli specife pri Esperantologio interesiĝis tri aliaj anoj de *Accademia Nazionale dei Lincei*: Bruno Migliorini (1896-1975), Elio Migliorini (1902-1988) kaj Alessandro Bausani (1921-

¹ Du el la plej prestiĝaj sciencaj prilingvaj institucioj en la tiama Italio. [n.d.r.]





1988). Bruno Migliorini atingis en 1938 la unuan oficialan katedron pri 'Historio de la itala lingvo' kaj prezidis la *Accademia della Crusca*² de 1949 ĝis 1963. De li memorindas la kolekto de esperantologiaj eseoj (1924-1964) – B. Migliorini, *Lingvaj aspektoj de Esperanto*, Edistudio, Pisa 2006, dua eldono [unua eldono 1985]. Elio Migliorini, lia frato, titola profesoro pri 'Geografio', ĉefe pritraktis la instruadon de Esperanto. Fine, la orientalist Alessandros Bausani [...] eĉ nun estas konsiderata internacie kiel unu el la plej aŭtoritataj teoriuloj de interlingvistiko. Kiel jam G.I. Ascoli, kiu en adoleska aĝo kreis la ludlingvon "Ascolino", Bausani kiel adoleskanto evoluigis la eksperimentan lingvon "Markuska". (Pennacchietti, 2011, pp. 17-18.)

Hodiaŭ, post la bedaŭrinda fino de la Torina sperto (daŭrigita, post la emeritiĝo de Pennacchietti, fare de Federico Gobbo ĝis la jaro 2019a), la sola universitato, kiu montras aktivan kaj specifan atenton al la temo,³ estas Parmo: pro tio ni fokusiĝos al ĝi.

2 Interlingvistiko en la Universitato de Parmo (Italio)

De jaroj Esperanto ĉeestas la Universitaton de Parmo. Kvar estas la plej gravaj agadoj, al kies naskiĝo mi kontribuis kaj kiujn mi mallonge prezentos.

² La itala AdE [n.d.r.]

³Tamen almenaŭ du aliaj italaj universitatoj menciindas: la Milana IULM, famkonata pro sia fondaĵo (vidu Montagner, 2018), kaj la Universitato de Trento, en kies statuto de la 'Corso di Laurea in Lingue e Letterature Straniere Moderne' de la 'Facoltà di Lettere e Filosofia', sub la titolo 'Linguaggi artificiali ed esperantistica' (D.R. 26.04.1984 n°. 487, Gazz. Uff. n°. 230 del 22.08.1984, art. 55), estas oficiale inkluzivita, kvankam ankoraŭ ne aktivigita, kurso en ĉi tiu kampo (Lastatempe (ekde la 20-a ĝis la 24-a de majo 2019a) estis tie organizita lekcio pri „Esperanto kaj lingva simpligo”, vidu <https://webmagazine.unitn.it/news/lettere/58417/corso-di-esperanto-e-semplificazione-linguistica>, kaj antaŭe estis gastigitaj pliprofundigaj okazoj: vidu almenaŭ la doktoran prelegon pri „Esperanto, ĉu minoritata lingvo?”, la 18-an de decembro 2018a, <https://webmagazine.unitn.it/evento/lettere/52148/esperanto-lingua-di-minoranza>). Por pli vasta enkadrigo de la temo vidu la freŝan Astori, 2020a.





Bildo 1 – Kovrilo de Astori, 2018b.



2.1 Kurso pri ‘Ĝenerala Lingvistiko’ ankaŭ Esperantlingva

Ene de la Universitato de Parmo ekde 2017 ekzistas dedistanca kurso pri ‘Ĝenerala lingvistiko’ – vidu:

<<https://elly.dusic.unipr.it/2019/enrol/index.php?id=586>>

La kurso estas elektebla en tri lingvoj: itala, angla kaj Esperanto. Oni ankaŭ verkis esperantlingvan manlibron pri ‘Ĝenerala Lingvistiko’: Astori, 2018a.

2.2 La ‘Premio „G. Canuto” por magistriĝa disertacio pri Interlingvistiko kaj Esperantologio’

La premio Canuto ekde dek unu jaroj (en la jaro 2019a oni festis la dek-jariĝon), dank’ al videblo en la amaskomunikilaro, ne nur loka, kaj la varbado en la italaj universitatoj, estas grava informilo pri ‘Interlingvistiko’.





Por skizi la historion de la Premio,⁴ oni referencas la vortojn de Paolo Andrei, Rektora Moŝto de la Universitato de Parma:

Estis la 29-a de oktobro 2010 – jam pasis dek jaroj de tiam – la kvindeka jarreveno de la forpaso de Giorgio Canuto, Rektoro de la Universitato de Parma de 1950 ĝis 1956. En la aŭlo de la Kavaliroj de la centra sidejo de la Universitato, en la mateno de la 16-a de novembro, kunveno kun la titolo “Kvindek jarojn post la forpaso de Giorgio Canuto” memorigis kaj celebris lian plurfacetan figuron de homo kaj sciencisto. Por substreki la valoron de la renkontiĝo alvenis la salutoj de la tiutempa Rektoro, Gino Ferretti, kaj, en la ĉeesto de la tiamaj Fakultatestro pri Beletro kaj Filozofio, Roberto Greci, Direktoro de la Departemento pri Klasika Filologio, Giuseppe G. Biondi, kaj de la orda Profesoro pri Glotologio kaj Lingvistiko, Guido Michelini; intervenis, por trakti la figuron de mia elstara antaŭanto, Guglielmo Masotti, orda Profesoro pri Jurmedicino (“Giorgio Canuto, homo de scienco”), Alessandro Mangia, Vicrektoro pri Esplorado, en tiu okazo ankaŭ kiel Prezidanto de Rotaria Klubo Parma (“Giorgio Canuto, la rotariano”), kaj Davide Astori, la inspirinto de la tago kaj de la Premio (“Giorgio Canuto, la eŭropista esperantisto”). Plue, post la transdono de la unuafoja Premio, la enkonduka prelego de Fabrizio Pennacchietti, emerita Profesoro de la Universitato de Torino kaj eksa orda Profesoro pri Semida Filologio, komisiito pri la kurso “Interlingvistiko kaj esperantologio”, pritraktis la temon “Interlingvistiko en Akademio”.

De tiu studa tago naskiĝis projekto, kiu dum du jarkvin plutenis sian vivecon, eĉ fariĝante ĉiam pli proponema, kiel evidentiĝas el la paĝoj pri la historio de la Premio entenataj en la unua parto de ĉi tiu volumo. Kaj ne eblas ne gratuli al la organizintoj, kiuj kapablis kune valorigi aktualajn sciencajn temojn, invitante, laŭvice, elstarajn fakulojn kaj stimolante esploristojn pli junajn kaj, ne laste, antaŭenigante la nomon de la Institucio, kiun mi estras, kaj la urbon, kiu ĝin gastigas. Ja ne estas hazardo ke, ene de la densa programo de “Parma Itala Ĉefurbo de la Kulturo” tuj trovis spacon iu evento, la venontan 15-an de oktobro en nia Ĉefa Aŭlo, por ree proponi al la urbanaro la figuron de la “Rektoro esperantista”, kiel li estas konata en la mondo de la “Lingvo Internacia”, kaj festi la dekjaran datrevenon de la Premio al li dediĉita.

⁴ Por pliprofundi ĝiajn historion kaj enhavojn vidu la jenajn kontribuojn: Astori, 2011; 2014a; 2014b; 2020b.





La bondeziro estas do, ke ĉi tiu momento de celebrado, sekura celo de jam signifoplena vojo, povu esti siavice renovigita komenco, alportanto de pliaj okazoj de riĉiĝo. La fakto, ke la trijara studkurso pri “Civilizo kaj modernaj fremdaj lingvoj” akceptis, ekde ĉi tiu akademia jaro, la instruadon de “Interlingvistiko”, estas pri tio jam iu unua, signifoplena atesto. (el Astori, 2020.)

2.3 Oficiala kurso pri ‘Interlingvistiko’

Kiel jam antaŭdirite en la supra prelego de la Rektoro, ekde la pasinta jaro ene de la programaro de la Universitato de Parmo disponigatas sendependa⁵ kurso pri ‘Interlingvistiko’. La programo legeblas ĉi tie:

<<https://cdl-clsm.unipr.it/it/degrecourse/details/184495>>.

Tiucele specife verkitas manlibro: Astori, 2019a.

2.4 Interlingvistika agado

Dum la lastaj jaroj apartaj tagoj estis dediĉitaj al specifaj interlingvistikaj temoj. Jen la lastatempaj⁶:

- konferenco pri „Tolkien lingvista e glottopoieta” (la 1-an de decembro 2017a) – vidu ĉe: <<https://www.unipr.it/notizie/1deg-dicembre-doppio-appuntamento-su-tolkien-lingvista-e-glottopoieta>>
- studtago pri „Alessandro Bausani fra Orientalismo, Interlinguistica e Fede Bahá’i” (la 25-an de oktobro 2018a) – vidu ĉe: <<https://www.unipr.it/notizie/25-ottobre-giornata-di-studio-alessandro-bausani-fra-orientalismo-interlinguistica-e-fede>>
- renkontiĝo kun Ottavio Fatica, tradukinto de John Ronald Reuel Tolkien (la 12-an de decembro 2019a) – vidu ĉe: <<https://www.unipr.it/notizie/12-dicembre-ottavio-fatica-spiega-come-si-traduce-tolkien>>

Post tiuj ĉi spertoj naskiĝis studenta grupo, nomita „Team Segni”, kiu, post organizado de ekspozicio en la jaro 2019 (ekde la 5-a ĝis la 7-a de julio,

⁵ Jam antaŭe inter la diversaj kursoj ne malofte spaco estas dediĉita al Interlingvistiko: la lasta kurso pri Ĝenerala Lingvistiko por la magistra diplomo (akademian jaron 2019-20), ekzemple, estis dediĉita specife al la temo „Esperanto, lingua pianificata fra vocazione ausiliaria e naturalizzazione” (oficiala adreso: <<https://www.unipr.it/ugov/degrecourse/181462>>), kaj estis eldonitaj, por studpli-profundigo, la jenaj du volumoj: pri lingvo kaj kulturo la dulingva (itale-Esperante) Astori, 2018b, kaj pri literaturo Minnaja, 2019.

⁶ La unuaj du kunfluis en la jenajn publikaĵojn: Astori, 2019b; Astori; Sicuri, 2019. Aliaj studtagoj okazis, kies enhavoj kolektiĝas en la jenaj Aktoj: Astori, 2015; 2016; 2017a; 2017b.





Berceto), ⁷ estas organizanta eventon titolitan „Segni: un percorso (inter)linguistico” ene de la programo de ‘Parmo itala kultura ĉefurbo 2020’.



Bildo 2 – Renkontiĝo de la studenta Grupo ‘Segni’.

Referencoj

Davide ASTORI, red. (2011) *A 50 anni dalla scomparsa di Giorgio Canuto. L’esperanto* n-ro 4 j. 88 (monografia numero).

Davide ASTORI, red. (2014a). *La Premio „G. Canuto” por magistriĝa disertacio pri Interlingvistiko kaj Esperantologio. Kvin jaroj da (inter)lingvistikaj pliprofundigoj en Parmo*. Milano: FEI.

Davide ASTORI (2014b). Ateneo Parmense. Premio di laurea “G. Canuto”. *Universum* n-ro 17-18, p. 16-19.

Davide ASTORI, red. (2015) *Inter Scienca Komunikado kaj Lingvaj Rajtoj (el la itala vidpunkto en eŭropa kadro). Memore al Arrigo Castellani*, Milano: FEI.

Davide ASTORI, red. (2016). *Esperanto e UNESCO. A 60 anni dalla Risoluzione di Montevideo. L’esperanto* j. 93 N.S. 1 (monografia numero).

Davide ASTORI, red. (2017a). *Esperanto è spiritualità?. L’esperanto* j. 94 N.S. 2 (monografia numero).

⁷ Vidu <<https://www.unipr.it/notizie/5-7-luglio-mostra-segni-un-percorso-nel-mondo-del-se-allestita-da-studenti-dellateneo>>.





Davide ASTORI, red. (2017b). „*Andiamo da Capacchi!*” *Il ricordo di un grande parmigiano a dieci anni dalla scomparsa*, Milano: FEI.

Davide ASTORI (2018a). *Enkonduke al Ĝenerala Lingvistiko*. Milano: FEI.

Davide ASTORI (2018b). *Due passi in Esperantujo. Una breve introduzione alla lingvo internacia, ragionata e con minima crestomazia*. Parma: Athenaeum.

Davide ASTORI (2019a). *Interlingvistika. Pianificazione, creatività, contatto*. Parma: Athenaeum.

Davide ASTORI, red. (2019b). *Alessandro Bausani (1921-1988) fra Orientalismo, Interlingvistika e Fede Bahá'í. A 30 anni dalla morte*. Parma: Athenaeum.

Davide ASTORI (2020a). *Kia interlingvistiko estontecen? Literatura Foiro* n-ro 306, p. 221-23.

Davide ASTORI, red. (2020b). *Dieci anni (2009-2019) di Premio „G. Canuto” per tesi di laurea in Interlingvistika ed Esperantologia. Con cinque interventi linguistici a Parma*. Parma: Athenaeum.

Davide ASTORI; Elisa SICURI, red. (2019). *Creating Worlds through Languages. Tolkien between Philology and Conlanguing*. Parma: Athenaeum.

Carlo MINNAJA (2019). *Introduzione alla letteratura Esperanto*. Parma: Athenaeum.

Andrea MONTAGNER (2018). Il ‘Fondo di Esperanto/interlingvistika’ dello IULM. En: Davide ASTORI (red.). *Quale interlingvistika oggi? Quattro voci sul tema. L'Esperanto*, monografia numero, p. 25-28.

Fabrizio Angelo PENNACCHIETTI (2011). L'Interlingvistika nell'accademia italiana. *L'Esperanto* n-ro 88/4 (*A 50 anni dalla scomparsa di Giorgio Canuto*, monografia numero, red. Davide ASTORI), p. 17-18.

Biografio de la aŭtoro. Davide Astori, magistrecio pri Beletro je klasika orientiĝo, doktoreco pri romanidaj lingvoj (LMU–Munkeno), diplomo pri paleografio (Ŝtata Arkivo de Parmo), ĵurnalisto, ekde 2015 asociita profesoro ĉe la Universitato de la Studoj de Parmo (Italio), post la hebrea, la araba kaj la sanskrita, instruas nun ‘Ĝeneralan Lingvistikon’, ‘Interlingvistikon’ kaj ‘Lingvon rumanan’. Inter liaj ĉefaj interesoj substrekindas: kontakto inter lingvoj kaj kulturoj, semidaj lingvoj, tradukscienco, lingvoj kaj mondkonceptoj, lingvaj kaj sociaj minoritatoj, soci-lingvistikaj aspektoj de naciaj identecoj. Specife pri la lingvo internacia li nombras pli ol 35 sciencajn publikaĵojn. Kun la eseo “La Zamenhofa revo inter lingvistika kaj religia plano: interpopola dialogo kaj tutmonda interkompreno per EO kaj Homaranismo” li gajnis la (unu)an Premion „Luigi Minnaja” de la ‘Belartaj Konkursoj de UEA’ 2011 (la prelego aŭdeblas ĉe <http://www.youtube.com/watch?v=stW8V1AZ-VM>). Li gajnis la Premion “Maŭro La Torre” 2015 (de ILEI) per la esploralaboro “La tradukoj de Pinokjo: kiel evoluis Esperanto inter 1930 kaj 2003”.





Rezolucio de MondaFest', kunverkita de la laborteamo pri la festivala temo

REZOLUCIO aprobita 2020-11-11



La Monda Festivalo de Esperanto, virtuala aranĝo, kiu okazis sub aŭspicio de Universala Esperanto-Asocio dum tri monatoj de junio ĝis septembro 2020, kun partopreno de kelkaj miloj da personoj el entute 97

landoj, kaj kun pli ol 500 horoj da programoj en la Internacia Lingvo Esperanto,

Debatis en serio da prelegoj, seminarioj, diskutaj sesioj kaj aliaj aranĝoj la ĉeftemon „UN 75-jara: Dialogo kaj interkompreniĝo en ŝanĝiĝanta mondo”, aparte traktante la tri kolonojn de UN, Pacon, Homajn Rajtojn kaj Evoluigon, kaj la Tagordon 2030 de Unuiĝintaj Nacioj,

Notis la atingojn de Unuiĝintaj Nacioj dum la unuaj 75 jaroj de ĝia ekzisto: rezultoj de la multflanka kunlaboro de la membraj ŝtatoj pri problemoj de paco, homaj rajtoj kaj evoluigo, kies dimensioj superis la povon de la unuopaj ŝtatoj unuope agantaj;

Konstatis, tamen, ke tiu kunagado estas ankoraŭ nesufiĉa por superi la tutplanedajn krizojn, kiujn ni nun frontas, kaj estas malhelpata de miskomprenoj kaj naciaj rivalecoj; sekve la estonteco de UN, kaj fakte de nia planedo, dependas de pli forta multflanka kunagado inter la registaroj, en kunlaboro kun la tutmonda civila socio;

Krome notis, kun aprobo, ke UN klopodas pli aktive engaĝi civilsociajn organizaĵojn, inter ili Universalan Esperanto-Asociation, por serĉi solvojn al tutmondaj problemoj kaj por realigi Tagordon 2030 kaj ties Celojn por Daŭripova Evoluigo;

Insistas pri tio, ke la membraj ŝtatoj de UN pli forte kaj celkonscie kunlaboru, flankenmetante siajn diferencojn, kaj ke la tutmonda civila socio pli konscie kaj insiste subtenu tiun kunlaboron;





Reasertas la pludaŭron de la plurjardeka kunlaboro de la Esperanto-movado kun la mondaj organizaĵoj UN kaj Unesko, kies valoroj kaj celoj tute kongruas kun la valoroj kaj celoj de la Esperanto-parolantoj;

Alvokas ĉiujn al observado de la homaj devoj pri monda solidareco, paco kaj multflanka decidado pri problemoj komunaj al la tuta homaro;

Rekomendas al ĉiuj esperantistoj ankoraŭ pli intense informiĝi pri la agadoj de UN kaj Unesko (ankaŭ pere de materialo pri UN eldonata en Esperanto), disvastigi tiujn informojn inter la publiko, insisti ĉe siaj politikistoj pri la valoro de multflankismo, kaj laŭeble mobilizi sin al kunlaboro kun UN kaj Unesko je ĉiu nivelo, ankaŭ pere de ties lokaj civitanaj asocioj;

Atentigas al UN kaj Unesko pri la bezono de pli inkluziva lingvopolitiko, se ili volas mobilizi la tutmondan socion ĉirkaŭ siajn celojn, kaj pri la valoro de utiligado de la internacia lingvo Esperanto por atingi homojn en multaj landoj – valoro kiun Unesko jam komencas sperti per sia admirinda eldonado de verkoj ankaŭ en Esperanto.

Interkulturaj valoroj de Esperanto kaj instruado de fremdaj lingvoj.

de Ariadna GARCÍA GUTIÉRREZ; *Diplomita pri Informaj Sciencoj de la Havana Universitato. Instruistino de Esperanto (ekde 2010). Instruistino de la Hispana (ekde 2018)*

La interkulturaj valoroj lernitaj pere de Esperanto povas kontribui al la instruado de fremdaj lingvoj, pere de lingva vidpunkto kaj senparola komunikado.



El persona sperto kiel juna instruistino de la hispana kaj de Esperanto, la temo allogas mian atenton, kun fokuso en la kulturo, komunikado kaj internaciaj interŝanĝoj.

Kiam mi instruas Esperanton, enlande ĉefe, mi iel povas antaŭvidi aŭ supozi, kiuj povas esti la ĉefaj facilaj kaj malfacilaj de lernantoj por lerni la lingvon, pro la memkono de la hispana kiel mia gepatra lingvo, kaj tio povus aspekti kiel avantaĝa rolo kiel instruistino; sed kiam mi instruas la hispanan al eksterlandanoj, kio ja estas sufiĉe nova profesio por mi, tiam ne





temas nur pri la scipovo de mia gepatra lingvo, sed ankaŭ pri la maniero transdoni tiujn sciojn al tiom malsamaj homoj, kies pensmanieroj kaj kulturoj tre diversas.

Influas kelkaj interkulturaj valoroj de Esperanto, kiel ekzemple, dekomence havi memfidan komunikadon kun tiu lernanto, sendepende de ties devenlando, lingvo kaj kulturo; gravas, ankaŭ dum la lerno-procezo, kune lerni ne nur pri la lingvo, sed ankaŭ pri la lando mem, ecoj kaj trajtoj, kiuj ja influas la instrumanieron.

Mi forte kredas, ke ni kiel instruistoj devas interesiĝi, pridemandi ĉu tio, kion ni legis aŭ scias pri la devenlando de nia lernanto, veras aŭ realas, kaj la plej bona maniero tion fari estas pere de interŝanĝoj, demandoj pri vivspertoj kaj opinioj, do, ne limigi nin nur al la informoj legitaj en gazetoj.

Sperti amikecon kaj senton pri la fakto, ke mi estas ne nur instruistino, tio estas, ke la interrilato povas esti amikeca; tio ja rezultigas gravan interkulturan valoron. Niaj sentoj dum la lerno-procezo sciigos nin pri niaj fortoj kaj malfortoj kiel instruistoj; pri la bezono studi ĉiutage kaj trovi niajn proprajn instrumanierojn, ĝui instruante kaj motivi niajn gelernantojn.

La interkulturaj valoroj de Esperanto reliefiĝas per la propono farata de ĝia movado, kiu kongruas kun la principoj de interkulturo, tio estas, la dialogo inter kulturoj kaj oponado kontraŭ ĉiuspecaj diskriminacioj, kaj aparte, la kultura kaj lingva diskriminacioj.

Esperantistoj, kiuj akceptas la principon de esperantismo, praktikas la harmonian kunvivadon interkulturan kaj la reciprokan respekton al la diferencoj, tial, interkulturo estas kvazaŭ filozofio, modelo kaj ilo nepra por solvi konfliktojn je ĉiuj niveloj, tio estas, en la internacia politiko, en la labora kampo kaj en la instruado, aparte en kunteksto, kie diversaj kulturoj kaj etnoj kundividigas la saman spacon.

Nia intereso, kompreneble, fokusiĝas al la instruado, en la lingvo-lernado. Kaj en tiu punkto, ne eblas komuniki nur pervorte sen fari gestojn aŭ mienojn, kiuj eventuale fariĝas parto de maniero de la lernantoj por komuniki dum sia vivo, pro tio ankaŭ endas paroli pri la graveco de ne-parola komunikado en lecionoj de fremdaj lingvoj.

Kiam ni salutas aŭ adiaŭas, eventuale tio signifas, ke ni bone fartas, ni ĝojas pro diversaj kialoj, kaj tio reliefiĝas ankaŭ en la lecionoj kaj atentendas en ĉiuj momentoj.





Se male, kaj surbaze de mia sperto, nia lernant(in)o komencas tuŝi siajn okulojn meze de la leciono, ofte tio povas signifi, ke li/ŝi lacas kaj tiam indus demandi: „Ĉu vi lacas?” Mi pensas, ke tio nepras, ĉar ne temas nur pri la fakto prepari lecionon kaj transdoni ĝin; se ne estas bona momento por tio aŭ sufiĉas la afero, la instruist(in)o devas klopodi kompreni kaj akcepti tion kaj pensi pri iu alia maniero transdoni la konojn aŭ praktiki aliajn aferojn pere de ludoj aŭ pere de dialogo plej malstreĉa por la gelernantoj, kaj tio eblas, interalie, danke al interŝanĝoj pere de ne-parola komunikado.

Klopodi kompreni ke ĉio influas en la lecionoj de fremdaj lingvoj, ekz-e: lingvaj kompetentoj de gelernantoj, personaj trajtoj, lingvaj influoj, familia kaj socia etosoj, devenlandoj kaj kulturaj identecoj, por menci i nur kelkajn, ludas gravajn rolojn por havi plej diversajn interkulturajn valorojn en lecionoj de fremdaj lingvoj, kaj estos gravaj helpiloj por instruisto, el mia modesta vidpunkto.

Kaj por fini, mi volas konkludi per frazo publikigita en la Eŭropa Konsilantaro de la Eŭropa Referenckadro en la jaro 2000: „Kompreni fremdajn kulturojn esencas por interkomprenado kaj komparado kun la propra kulturo, kaj resti en la mezo por starigi ekvilibron inter ambaŭ”.

SAT fondiĝis antaŭ cent jaroj

de Mireille GROSJEAN



Ni instruistoj instruas, do donas kadron kaj formon al scioj, kiuj devas eniri la kapon de niaj lernantoj kaj espereble resti tie eterne. Laŭ tio ni komprenas, ke el moviĝanta realeco ni devas fari ion simplan, kompreneblan. En Rusio loĝas rusoj, en Ĉinio loĝas ĉinoj, en Togolando loĝas togolandanoj. Tamen mi renkontas togolandanojn en Benino, francoj vivas en Svislando, britoj ekloĝas en Usono. La realo estas ne klara, ne simpla, ne eterna. En la instruado ni ne povas krei spacon por transdono de fluantaj faktoj kaj veroj.

SAT-amikaro estas asocio el SAT, kiu celas labori en francparolaj landoj. La organo de tiu asocio nomiĝas „La Sago”. SAT-amikaro tre gravas en Afriko. Ĝi eldonis poŝvortaron franca-Esperanto kaj malavare sendas ĝin al afrikaj kluboj kaj asocioj. Pri SAT-amikaro mi legis, ke: „SAT-Amikaro

IPR 21/1 ➤ 14





vivis ĉiam ne per grandiozaj planoj sed per la persista, amika kunlaboro de samidealaj kamaradoj subtenataj de reciproka fido”.

La slogano de SAT estas „SAT-anoj kutimiĝu al eksternacia sent-, pens-kaj agad-kapablo!” Tion oni legas sur ĉiu numero de ĝia revuo „Sennaciulo”. Nacio estas firma kadro intelekta, kiun ni akiras en la lernejo kaj en la familio. En nia memoro estas landoj ĉirkaŭitaj de landlimoj, ni memoras pri ĉefurboj... Ni estas formatitaj. Miaj lernantoj firme asertis: „Mi ne estas pura ano de nia urbo, ĉar mia avino estas el Hispanio”. Alia samopiniis asertante, ke ŝia patrino estas el Italio, ktp... Pura sviso ne ekzistas. Mia avino estis el Nederlando... Ĉiu vivo estas renkontiĝo, skribis Martin Buber. Vivo aperas per mikso.

Ni pensu pri Zamenhof: „Ne rusoj kun poloj, sed homoj kun homoj”. Ĉio klaras. Klare ni devas instrui simple kaj traveble. Tamen per vortoj ni povas atentigi niajn lernantojn, ke la lernendaj teorioj estas provo prezenti la realon, kiu foje eskapas kaj transformiĝas. Ni malfermu la pordon al fluaj realaĵoj. La tasko de niaj lernantoj estas salti en veturantan trajnon kaj kunveturi dum kelkaj jaroj.

WIKIPEDIA dudekjara

de Mireille GROSJEAN



WIKIPEDIO
La libera enciklopedio

Kiu neniam uzis tiun mirindan retan enciklopedion? Kiu ne uzas ĝin por salti de lingvo al lingvo por trovi taŭgan tradukon por iu vorto? Kiu ne korektis iun eraran frazon en ĝi? Kiu ne aldonis iun informon en ĝin? Kiu ne aldonis iun etikedon por ligi vorton kun samsignifa artikolo? Eble kelkaj el ni eĉ kreas artikolojn tie.

Wikipedia, en Esperanto Vikipedio, estas libera enciklopedio. En tiu medio, kie regas interŝanĝoj kaj permeso aliri al malfermitaj dokumentoj kopieblaj, oni

IPR 21/1 ➤ 15





inventis signon, kiu aperas kiel c, sed ne malfermita al dekstro, sed malfermita al maldekstro. Tion la gvidantoj de vikipedio nomas ne *copyright* sed *copyleft*. Fakte estas, ke la vorto rajto kaj la vorto dekstra estas la samaj en la germana (*das Recht*), en la franca (*le droit*), en la angla (*the right*). La baza ideo de Vikipedio estas ĝia malfermiteco. Iu povas ion aldoni. Eble vi dubas pri ĝia fidindeco... Tamen iu povas ankaŭ korekti, kaj la fina rezulto estas io sufiĉe valida. Estas ankaŭ administrantoj kaj kontrolantoj. Estas reguloj, estas provejo, estas mentorado. La laboro en vikipedio estas facila, ĉar ekzistas multaj klarigoj tre trafaj. La redaktora laboro postulas precizan skribadon kaj atenton; fermi HTML-etikedon se oni malfermis la saman etikedon, tion oni ne rajtas forgesi; sed ĉiu kapablas fari tion.

En Vikipedio estas komuna kolekto de fotoj. Tien iras la redaktantoj de iu versio por preni fotojn, kiuj estas libere kopieblaj. Do la fotoj ne ligiĝas al iu specifa versio.

La ideo estis lanĉita la 15-an de januaro 2001 kaj la Esperanto-versio samjare. Chuck Smith faris tiun komencan laboron, kaj sekvis diversaj kontribuantoj el plej diversaj mondopartoj.

Kiam mi esperantistiĝis, – en la jaro 1985 – mi tuj havis kontaktojn kun afrikanoj. Iam iu afrikano skribis al mi: vi eŭropanoj devas verki resumojn pri ĉiuj sciencoj, tiel ke ni afrikanoj povu aliri al scioj sen uzi la koloniajn lingvojn. Mi bone komprenis la senton. Mi klare vidis, ke temas pri giganta laboro. Nun ni havas tion, tio estas Vikipedio en Esperanto. Baldaŭ ni atingos 300 000 artikolojn. Bonvole aldonu artikolojn, tiel ke en tiu jubilea jaro 2021 nia versio en Esperanto atingu 300 000 artikolojn.

Por ni instruistoj tiu enciklopedio estas trezoro. Ni povis informiĝi en ĝi, ĝi estas neelĉerpebla fonto de scioj. Ni povas gvidi niajn lernantojn al ĝi. Plej ofte la lingvo estas altnivela, do bona modelo por legemuloj kaj scivolemuloj. Ni povas lanĉi komunan redaktadon de artikolo aŭ artikolparto en nia klaso, ekzemple pri nia urbo aŭ vilaĝo jene: en pluraj artikoloj pri urboj aperas ĉapitro: *Urbo X kaj Esperanto*, kaj tie legiĝas pri kongresoj kaj gravaj eventoj. Viaj klasanoj povus verki tiajn aldonajojn. Por altigi la valoron de la artikoloj, gravas aldoni plej diversajn fontojn, kiel artikoloj en revuoj, filmoj en la Reto kaj similaj. Se vi trovas erarojn en iu artikolo, vi povas lanĉi viajn lernantojn al ĉasado de ili.





El la landoj kaj sekcioj...

Britio (Skotlando)

Progreso ĉe la Universitato de St. Andrews

St. Andrews estas la plej renoma kaj longviva universitato en Skotlando.

Legu pri tio ĉe: <https://www.liberafolio.org/2020/05/18/esperanto-allogas-esploristojn-pri-internaciismo>; <http://standrewstransnational.wp.st-andrews.ac.uk/research/esperanto-and-internationalism-c-1880s-1930/>

Prof. Bernhard Struck informas nin, ke la Centro de Esperanto-studoj ĉe la Universitato de St. Andrews bone progresas. Ĉiuj tri unuajaraj doktoriĝaj studentoj faris konsiderindan progreson: Marcel Koschek, kiu esploras pri Varsovio kiel ĉefloko, lokaj kaj transnaciaj retoj, kun ĉefa fokuso al TEKA kaj kuracistoj; Pilar da Lamo Requero pri Katalunio kaj la Ibera Duoninsulo, Esperanto kaj naciismoj en tiu regiono; kaj Manuela Burghilea, kiu faras ciferecajn esplorojn anstataŭ surloka laborado en Rio-de-Ĵaneiro, ĝis sekura vojaĝado eblos. La grupo organizis iom da kunvenoj antaŭ la kronviruso, kaj poste rete per *Zoom* kun la Glasgova Esperanto-klubo, bonvenigante prezenton de Guilherme Fians en Manĉestro.

Mallonga intervjuo pri la agado de la grupo aperis en Libera Folio (*vidu supre*).

Peris Mireille GROSJEAN

Transnacia historio

Naskiĝis en decembro 2020 retejo de la teama projekto "Esperanto kaj Internaciismo", gastigata de la Universitato de *St Andrews*, Skotlando. La projekto estas bazita en la Instituto por Transnacia kaj Spaca Historio de *St Andrews* kaj celas esplori la fruajn jardekojn de la Esperanto-movado (ĝis la jardeko 1920). Parto de la projekto temas ankaŭ pri la revigliĝo de la Esperanto-movado en la nuntempo.

La membroj de la teamo estas profesoro Bernhard Struck kaj la doktoriĝantaj studentoj Manuela Burghilea, Marcel Koschek kaj Pilar Requejo de Lamo. La areoj kovritaj de iliaj esploroj rilatas ĉefe al Bohemio, Skotlando, Hispanio, Pollando kaj Brazilo.

En la retejo regule publikiĝos blogaĵoj, mapoj kun lokaj esperantistoj aŭ partoprenintoj de internaciaj kongresoj, biografioj de pioniroj de la Esperanto-movado kaj intervjuoj kun nuntempaj esperantistoj.

Vizitu la novlanĉitan retejon ĉe

<https://www.transnationalhistory.net/esperanto/en/705ea-home/>

Burghilea MANUELA





Ĉinio

Novaĵoj el Zaozhuang

Post subskribo de interkonsento inter UEA, ILEI kaj Zaozhuang-a Universitato de Ĉinio, ni neniam kontaktiĝis por reciproka informado pri nia kunlaboro. Pro la pandemio la internacia kunlaboro malfacile okazas. Nun mi volas raporti al vi pri la laboro en 2020 de la universitato kaj la Eo-Muzeo:

- 48 gestudentoj de la Esperanto-fako studas en la universitato, D-roj Maciej, Bak Giwan kaj la instruistoj Sato kaj Semio instruas tie.
- En la jaro 2020 la muzeo ricevis 1650 kolektaĵojn el 6 landoj, la plej multaj estas pli ol 600 libroj, kolektitaj de la islanda verkisto Baldur Ragnarsson.
- En la jaro 2020 la muzeo gastigis 2022 vizitantojn el Ĉinio.
- La universitato verkis kaj eldonis la libron *Eventoj pri Esperanto-Movado*.
- Nun la universitato planas varbi internaciajn studentojn por la Esperanto-fako.



Mi esperas, ke ni tri organizoj povos kunlabori laŭ la interkonsento. Pli bone estas, ke ni kune varbu kaj informu internaciajn studentojn por nia afero.

sincere via Semio





Germanio

Esperanta eksterkadra studsemajno en Frankfurto ĉe Majno

De la 30-a de novembro ĝis la 4-a de decembro okazis ĉe popola altlernejo en Frankfurto ĉe Majno „Esperanto-semajno”, aŭ oficiale: „Eksterkadra studsemajno” (*Bildungsurlaub*) Esperanto. Eksterkadra studsemajno en Germanio estas speciala formo de entreprena forpermeso, dediĉenda al profesia aŭ politika pliklerigo de la dungitoj. Al la plej populara formo de tiaj (kutime unusemajnaj) intensaj kursoj apartenas lingvo-kursoj. Post sukcesa okazigo de diversaj Esperanto-kursoj dum la pasintaj du jaroj la popola altlernejo de Frankfurto ĉe Majno decidis okazigi tian intensan kurson en formo de ŝtate agnoskita edukad-forpermeso ankaŭ pri Esperanto. Nia lingvo tial fariĝis samranga kun aliaj „grandaj” lingvoj – ekzemple la angla, franca, rusa aŭ pola.



Al Esperanto-semajno aliĝis jam relative frue post la anonco (kaj malgraŭ la pandemiaj malcertecoj) kvar interesigantoj. La kvintaga kurso daŭris de la 10-a matene ĝis la 17-a posttagmeze ĉiutage, el kio 75% konsistis el lingvolernado kaj 25% el kultura parto. La kulturan parton konsistigis informoj pri la *Vivo de Zamenhof*, *influo de germana kaj jida lingvoj al Esperanto*, *skizo de Esperanto-literaturo*, *historio de Esperanto en Germanio*, kaj *Esperantaj muziko, filmoj kaj reklamo*. La lingvon mem la kursanoj lernis en konversaciaj situacioj (orientiĝo en la urbo, vizito de restoracio, ktp.), per lingvoludoj, kaj kompreneble ankaŭ per ekzercado pri la gramatiko. Je la fino de la kurso ili jam kapablis legi kaj kompreni fragmentojn el Esperanta literaturo, i.a. de Julio Baghy. Danke al plej moderna teknika ekipaĵo de la popola altlernejo eblis senprobleme eĉ aŭdigi fragmentojn de la Zamenhova voĉo kaj spekti fragmenton de „Inkubo” kun William Shatner – post kvar tagoj de intensa lernado la kursanoj jam kredinde kapablis kritiki la elparolon de kelkaj aktoroj kaj tre trafe perceptis iliajn lingvajn erarojn.


La kurso estis tre sukcesa kaj rilate la lernadon de Esperanto, kaj ankaŭ rilate

IPR 21/1 ► 19





la sintenon al Esperanto fare de la altlernejo mem. Por la venontaj semestroj denove estas planataj pliaj Esperanto-kursoj kaj eksterkadrĵaj studsemajnoj – ankaŭ por progresintoj je la nivelo B2.



Martin PTASIŃSKI (AGEI)

Italio

Ni estas klaso kun 21 lernantoj. Ni ĉeestas la kvinan klason ĉe Elementa Lernejo de Verdello (Norda Italio) kaj ni studas Esperanton ekde tri jaroj. Ni ŝatus korespondi kun klaso de samaĝaj gelernantoj. Bonvolu kontakti nian instruistinon *Antonella PIGNATIELLO*: unicamedusa@gmail.com. Dankon!

Litovio

La novaĵretejo "Mano kraŝtas" (Nia lando) plu publikigas retajn lecionojn de Esperanto. Nun aperis jam la tridekoka. Bonvolu reklami tiun eblon lerni Esperanton inter neesperantistoj: [https://www.manokraŝtas.lt/straipsnis/la-38-a-leciono-\(pamoka\)](https://www.manokraŝtas.lt/straipsnis/la-38-a-leciono-(pamoka)). La kurso aperas kun tradukoj al la litova.

Povilas JEGOROVAS





Pollando

La 5-a Interlingvistika Simpozio kun la titolo „Rolo de lingvoj en interkultura komunikado” okazis 17-18.09.2020 en virtuala formo kun rekorda nombro da partoprenantoj (pli ol 300 el pli ol 50 landoj) kaj preskaŭ 60 prelegoj en 3 lingvoj (Esperanto, angla kaj pola).

Programo, resumoj kaj raporto legeblas:

- en Esperanto

<http://interl.home.amu.edu.pl/interlingvistiko/simpozio2020.html>

- en la angla

<http://interl.home.amu.edu.pl/interlingvistiko/studojen.html>

Ilona KOUTNY

Gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj kiu organizis la simpozion

Pri Zamenhofaj Festoj la 15-an de decembro

Bolas la ideoj kaj la preparlaboroj en la kluboj, kiam la 15-a de decembro alproksimiĝas. Malgraŭ la bremsoj de la pandemio ni povis aŭdi kaj legi diversajn raportojn pri tiuj kunvenoj. La kutimaj klubanoj venas; eble ili alportas manĝaĵojn kaj trinkaĵojn. Ofte venas gastoj. Tiam estas okazo prezenti la lingvon en prelegeto kaj enkonduki la lingvon per kurseto. Estas bona okazo komenci kontaktojn kun interesatoj. La strategio devas esti bone elpensita kaj preparita. La Zamenhofa Festo ankaŭ povas esti okazo eldoni artikolon en loka gazeto kaj/aŭ organizi eventon kiel Lingva Festivalo. Vidu sube la agadon en Rusio. Alia eblo estas verki poemon, kanti ĝin kaj sendi ĝin al la tuta mondo, kiel faris Maria Lazare Laroca el Brazilo. Tiu Tago povus esti preteksto por lanĉi ekspozicion, por promeni surstrate kun ŝildoj kaj muziko, por skribi pri Eo en la sociaj retoj (vidu la vastan kampanjon en 2020 lanĉitan de Henri Masson en Francio). Do en tiu Tago ni forlasu nian kvietan vivon kaj montru nin al la mondo.

La 15-a de decembro estas ankaŭ **la Tago de la Libro**.

Lige al tio ILEI lanĉis programon: **Komuna Legado okaze de la Tago de la Libro**. Ekde 2016 la Estraro de ILEI elektas tekston, kiun ĝi proponas al la esperantistoj en la tuta mondo. Do la sama legaĵo vekas intereson, diskutojn, demandojn kaj respondojn en la kluboj.

En 2020 la teksto estis bela poemo de Julia Sigmond.

IPR 21/1 ➤ 21





JULIA SIGMOND (1929 – 2020)

La hungardevena rumana civitanino, emerita pupaktorino, konata Esperanto-verkistino mortis la 23-an de marto 2020 en Piacenza, Italio. Ŝia forpaso estas granda perdo por la originala Esperanto-literaturo.

La 27-an de marto en la sama hospitalo forpasis ŝia edzo Filippo Franceschi, **Sen Rodin**. Li junaĝe lernis Esperanton en sia naskiĝurbo Padova. Post la emeritiĝo li translokiĝis al eta vilaĝo en la Apeninoj apud Piacenza kaj tien translokiĝis Julia post ilia geedziĝo.



Unu el la lastaj libroj eldonitaj de Julia estis aro da tradukoj de ŝia poemo "*Dialogo*", en 52 lingvoj.

([Júlia Sigmond - Vikipedio \(wikipedia.org\)](https://en.wikipedia.org/wiki/Julia_Sigmond))

DIALOGO

Kaj se jam ĉion ni rakontis, pri kio ni parolos?

- Ĉiam ekzistos io, pri kio paroli.

Kaj se ne plu estos?

- Tiam ni silentos.

Kaj tiam ni ne plu amos unu la alian?

- Tiam ni eĉ pli amos unu la alian.

Kaj tiam ne doloros la silento?

- La silento ne doloras, se ni amas.

Kaj se la silento doloros?

- Tiam ni denove ekparolos.

Kaj pri kio ni parolos?

- Pri tio, kial doloras la silento.

Kaj tiam ni amos nin unu la alian?

- Ĉiam ni amos unu la alian.

Kaj se ni ne scios, kial doloras la silento?

- Tiam ni kantos.

Kaj se ni ne konas la kanton de la alia?

- Tiam ni instruos unu la alian.

Kaj se ni ne povos lerni ilin?

- Tiam ni aŭskultos la kantojn de la alia.





Kaj se ni jam ne aŭdos?

- Tiam silente ni rigardos unu la alian

Kaj se ni ne plu vidos?

- Tiam ni prenos la manon de la alia.

Kaj tiam ankoraŭ ni estos feliciaj?

- Dum ni vivos ni estos felicaj, ĉar ni amos unu la alian.

Jen du raportoj pri Zamenhofaj Festoj en Orienta DR Kongo.

Vi povos konvinkiĝi, kiom agemaj estas niaj samideanoj en DR Kongo.

1) La Zamenhofa Naskiĝtago en Rutshuru. (Provinco Kivu, Orienta DR Kongo)

Ĉio okazis bone en Rutshuru. La klubo Rondo Esperantista de Kiwanja (REK) trovis favoron de la estro de la institucio Nyongera (lernejo de la komunumo 34-a CADAFA). La vicpastoro de tiu preĝejo ĉeestis kaj eĉ partoprenis en la ludamuzado. Joel Muhire parolis pri la historio de Esperanto, disdonis priesperantajn informfoliojn. Kambale Amani Love prelegis pri „Komunikado kaj misinformado” kaj Frato Elie kiu reĝisoris la tutan programon, faris etan kurson de Esperanto. Antaŭ ol disiĝi, Kambale Amani Love kun sia kunakrobato faris amuzan ĵongladon, kaj ni poste interkonatiĝis per bulĵetado al apuduloj. Ni ĝoje ridis kaj decidis ke tiaj renkontiĝoj estu oftaj, almenaŭ unu fojon monate!

Vivu Esperanto, vivu Zamenhof, la iniciatinto de Esperanto!

Raportis Joel MUHIRE

2) Dum la naskiĝtago de Ludoviko Lazaro Zamenhof la 15-an de decembro 2020 en la provinco Norda-Kivuo / teritorio de Rutshuru, Demokratia Respubliko Kongo, okazis jenaĵoj:

Ni ĝojas atingi ĉi tiun naskiĝdaton de Ludoviko Lazaro Zamenhof kiel lian hodiaŭan naskiĝtagon en nia Rutshuru-Teritorio. Estas evidente por ĉiuj neesperantistoj partopreni ĉi tiun tagon kune. Jen la tagordo de la bone aranĝita programo:

1. Kantado de la internacia Esperanto-himno "LA ESPERO"
2. Prezento de la membroj, iliaj funkcioj kaj la gastoj
3. Malferma vorto de la Prezidanto de VSK-Klubo
4. Prezidanta parolado de Klubo Verda Stelano





5. Komento pri la datreveno de la naskiĝo de la iniciatinto de Esperanto.

6. Koktelo

La ceremonio komenciĝis de la kluba prezidanto la 15-an de decembro 2020. La VSKlubanoj kaj la ĉarma porinfana grupo „ĈIAM ANTAŬEN” kantis la internacian himnon „La Espero”.

Raportis Honoré SEBUHORO

El la parolado de Honoré Sebuhero:

Karaj gastoj kaj eminentaj membroj de la Esperantoparolanta mondo,

Ni tre ĝojas bonvenigi vin ĉi tie al nia forumo por rakonti al vi mallongan historion pri la Esperanta lingvo.

Kompreneble, ke la fondinta aŭtoro travivis multoblajn malfacilaĵojn kreante ĉi tiun lingvon. Li konkeris kaj gajnis ĝian rekonon eĉ fare de l' Unuiĝintaj Nacioj kaj UNESKO. Resume, nia Esperanta lingvo riĉiĝis, riĉiĝis kaj fariĝis pli subtila. Ĝi estas viva lingvo, ĉar ĝi persistas, ĉiam daŭros kaj neniam malaperos. Ĉi tiu lingvo estis proponita al ni kiel neŭtrala internacia lingvo en 1887 fare de Doktoro L.L. Zamenhof, kuracisto, kiu loĝis en la okcidenta parto de granda imperio. Ĝi povus tiam evolui kaj iĝi dua internacia lingvo por ĉiuj.

Zamenhof opiniis, ke neŭtrala lingvo apartenanta al ĉiuj homoj ne nur havigos praktikecon, sed ankaŭ kontribuos al konflikto-mildigo kaj al antaŭenigo de la paco.

Esperanto jam atingis gravan rezulton: ĝi fariĝis viva transgeneracia lingvo kaj estas uzata de miloj da parolantoj tra la mondo. Iuj el tiuj homoj kunvenas en asocioj. Universala Esperanto-Asocio (UEA) registras membrojn en pli ol 114 landoj. (...) La internacia uzo de reduktita nombro da lingvoj distordas kulturen interŝanĝon kaj malekvilibrigas la fluon de informoj favore al politikaj, ekonomiaj kaj ideologiaj elitoj de lingve privilegiitaj landoj. La uzo de neŭtrala kaj pli facile lernebla lingvo povus parte restarigi ekvilibron kaj justecon.

Esperanto estas egalrajteca, ĉar ĝi permesas al larĝaj tavoloj de la popolo el diversaj landoj komuniki sen lingvaj kaj politikaj baroj. Esperanto-lernado postulas ĉirkaŭ trionon de la necesa tempo por lernado de la angla aŭ germana lingvoj. Komprenu, ke Esperanto havigis al si rezolucion en 1954 fare de UNESKO kaj estis agnoskitaj gravaj rezultoj atingitaj de ĝi en la kampo de internaciaj interŝanĝoj kaj alproksimiĝo de la popoloj.





En Rusio

La 5-an kaj la 6-an de decembro tre sukcese okazis virtuala Moskva lingva festivalo N15, organizita de Moskva Esperanto-Asocio MASI.

<https://sezonoj.ru/2020/12/ruslando-22/>

Okaze de la Zamenhof-Tago en la populara porinstruista kaj porlernejana reta revuo *Mel* (Kreto) aperis granda artikolo pri Esperanto surbaze de intervjuo kun Irina Gončarova. La artikolon legis ĉ. 5800 homoj.

<https://mel.fm/izucheniya-yazykov/3541069-esperanto#comments>

En Brazilo

Al L. L. Zamenhof

Je l' vojmezo de l' urbaj ĝangaloj
l' anim de l' mond' vagadas
baraktante tra bruega lum'.

Perfort' regas, ĉifonas moral';
Senkapigojn barbarajn
oni spektas per televidilo.

Kvankam l' arbareg' ne obskuras,
ĝi vojiradas blinde
laŭ riveroj el fantomoj hidaj:

Ho Di'! Kien la homaro iras?
Ĉu l' mondanim' fiaskis?
- Ne! - krias idealo:
L' espero pacience obstinas...

Maria NAZARÉ LAROCA

Juiz de Fora. 08/12/2014.

<http://www.nazarelaroca.blogspot.com.br/>

Anoncoj

„Espéranto propédeutique 2019”

Ĵus ricevita verko, aparte grava por Eo-instruistoj, senpage elŝuteblas:

„*Espéranto propédeutique 2019*” (en la franca)

<https://bernardsergent.fr/esperanto/>

La aŭtoro: https://fr.wikipedia.org/wiki/Bernard_Sergent (kiu verkos pri li en eo.wikipedia.org/)

IPR 21/1 ➤ 25





Bernard SERGENT, franca historiisto kaj arkeologo, esploris abunde pri mitoj kaj ne restis en eŭropaj teritorioj, sed esploris ĝis Barato. Li multe verkis pri mitoj, lingvoj kaj historio. Li aktivas socie kaj kunlaboris kun Eŭropo Demokratio Esperanto (EDE) okaze de la elektoj por la Eŭropa Parlamento.

Informilo por Interlingvistoj

Esperanto-studoj, sciencaj esploroj pri Esperanto kaj lingvaj rajtoj, kunvenoj pri ĉi tiuj temoj, bibliografiaj indikoj pri aperintaj libroj aŭ artikoloj de vi aŭ de viaj konatoj en kiu ajn lingvo estas tre bonvenaj ĉe la redaktanto de la Informilo por Interlingvistoj, Angela Tellier, angela.tellier@esperantic.org. IpI estas speco de oficiala bulteno de la intelekta tavolo de Esperantujo. Ĝi estis iniciatita de la kar-memora Detlev Blanke kaj servas nian komunumon de multaj jardekoj.

250+ fakaj Esperanto-vortaroj en la reto!

Kolekto de Esperantaj fakaj vortaroj kaj terminaroj, troveblas en interreto. La vortaroj kaj terminaroj estas **libere uzeblaj, legeblaj kaj elŝuteblaj!** La kolekto inkluzivas ankaŭ laŭtemajn vortarojn, kiel tabuaj vortoj, kuirado, rim-vortaroj, maldecaj vortoj, ĵargono ktp. La kolekto estas parto de **Scienca kaj Teknika Esperanto-Biblioteko, STEB**. Ĝi estas daŭre aktualigata. Se vi konas mankantan eron - bonvenas via sciigo!

Adreso de la vortara kolekto: <http://www.eventoj.hu/steb/vortaroj/>

SZILVÁSI László

Lerni la ciferecon kaj lerni ciferece

En belga ĵurnalo estis interesa artikolo pri la ĝeneraligo de cifereca instruado en la lernejoj, i.a. pro la korona viruso (*) laŭ D-ro Benoit Galand, profesoro pri edukaj sciencoj en la Universitato de Louvain (Lovenjo, Belgio).

Laŭ li estas granda diferenco inter ***lerni la ciferecon*** kaj ***lerni ciferece***. Fakte, la interagado ebligita de ĉi tiu ilo rapide troŝarĝas la atenton kaj labormemoron. Studoj montras, ke tiel studentoj ĝenerale lernas malpli bone ol per papera komunikilo. Krome, kaŝitaj kostoj estas ligitaj al la vasta uzo de cifereca teknologio en la lernejo. Nepras aĉeti la aparataron, tio estas nur parto de la ciferecaj kostoj. Oni devas pensi ankaŭ pri regulaj ĝisdatigoj kaj





pri la rapida malnoviĝo de komputila aparataro. Sen menci, ke por produkti komputilojn kaj tablojdojn oni devas ĉerpi maloftajn minaĵojn, malgraŭ mediaj reguloj. Krome malnovaj komputiloj kutime alvenas en rubo-deponejojn en sudaj landoj.

Sed, kian lokon oni devas doni al cifereco en edukado? Estas vigla debato inter tiuj, kiuj diras, ke estas ĉefprioritato renkonti hodiaŭajn edukajn defiojn kaj la bezonojn de nia ekonomio, kaj tiuj, kiuj kredas, ke ĝi estas minaco por la intelekta disvolviĝo kaj sano de niaj infanoj. Laŭ prof. Galand, la celo de tiu teksto estas resumi studojn pri la efikoj de cifereca teknologio ĉe studentoj. Pli specife, sep aktualaj ideoj ĉirkaŭ cifereca edukado estas diskutitaj: 1) la interagado kaj plurrimeda naturo de cifereca akcelado; 2) cifereca teknologio antaŭenigas aŭtonomion de lernantoj; 3) cifereca instruado pli instigas; 4) videoludoj kaj programado ebligas disvolvi transversajn kapablojn; 5) scioj haveblas interrete, do ne necesas instrui kaj lerni ilin; 6) la hodiaŭaj lernantoj esence diferencas de tiuj, kiuj venis antaŭ ili; 7) cifereca teknologio ebligas malaltigi la kostojn de edukado. **La rezultoj indikas, ke ĉi tiuj ideoj plejparte malĝustas.** Koncerne la lernadon, cifereca teknologio ŝajnas nek pli bona nek pli malbona ol alia ilo aŭ rimedo, sed havas kaŝitajn kostojn, kiuj ofte estas malmulte menciitaj. (<https://ojs.uclouvain.be/index.php/cahiersgirsef/article/view/54253>).

(*) **La Dernière Heure, Maïli Bernaerts, "La généralisation du numérique a un coût politique", 23 nov. 2020, p. 11)**

Informis: Germain PIRLOT

Landaj gravaĵoj kaj laboroj farendaj kaj farataj

Stefan MACGILL (Hungario)

LA: Gravas landa aŭ regiona agado, ankaŭ por ILEI! ILEI havas gravajn taskojn tie. La estraro de ILEI devas nomumi respondeculon pri sia landa aŭ teritoria agado. TEJO nomumis respondeculon, mi respondecas por UEA. Tria respondeculo de ILEI povus krei triopon kaj tre forte kunlaboros! Finnlando anoncis la baldaŭan fermon de la ILEI-sekcio. ILEI en Svedio, Norvegio kaj Islando ege malfortas (kiel trovis AMO 70). Srilanko profunde ekdormis (ankaŭ ĉe UEA). Aparte alarma estas la silento de la franca sekcio – lando, kie la instruistoj pioniris – en la starigo de ILEI mem kaj en la akiro de la kastelo Greziljono en 1953. Same miriga estas la manko de Hispanio

IPR 21/1 ➤ 27





kaj Katalunio, landoj iam kun granda laboro! Loko por laboro: Filipinoj – tie komplete mortis la tradicia movado kaj naskiĝis tute nova junulara movado. Ilia motoro ja iĝis la estrarano de TEJO pri landa agado. Certe ili tie bezonas (eble havas) instruistojn!

La bazo por plia esplorado estas <https://www.ilei.info/instancoj/sekcioj.php> plus la listo en IPR 2020/01. Multaj sekcioj ne havas montritan adreson, ĉar ili ne donis la aperigan permeson bezonatan laŭ la eŭropaj leĝoj pri privateco. Tiujn sekciojn mi indikas per *.

- ❶ Landoj aŭ teritorioj sen sekciestraj informoj en la retejo de ILEI: Armenio*, Benino*, Bulgario*, Francio*, Hispanio*, Katalunio*, Kongo DR*, Kubo*, Meksiko*, Nepalo*, Norvegio*, Sud-Afriko*, Svedio* kaj Vjenamio* (13 – ĉiuj mankas nur pro la eŭropaj reguloj. Tiuj sekcioj kiel eble plej baldaŭ donu aŭ maldonu permeson por la aperigo de la sekciaj adresoj.)
- ❷ Landoj aŭ teritorioj sen reprezentantaj informoj en la retejo de ILEI: Niĝerio*, Pakistano*, Rusio*, Slovakio (vakas), Tajvano*, Urugvajo* (6 – nur unu vere vakas).
- ❸ Landoj aŭ teritorioj sen kontaktpersonaj informoj en la retejo de ILEI: Bolivio*, Bosnio kaj Hercegovino*, Haitio*, Kenjo*, Kostariko*, Nikaragvo*, Portugalio (vakas), Srilanko* kaj Venezuelo* (9 – el kiuj kvar estas suspektataj vere malaktivaj.).

Sekve, el la 70 landoj principe kun teritoriaj entoj, 28 ne montras informojn, plejparte pro tiuj eŭropaj reguloj, kaj manko de reago de la koncerna sekcio aŭ teritorio – en si mem signo pri nesufiĉa aktiveco. La plena listo de adresoj aperas fine de la nuna numero.

LAPA: Tiu mallongigo signalas persistan servon de UEA: <Landa Parad’>. Esence temas pri perreta daŭrigo kaj plibonigo de la parto de la siatempa Jarlibro pri la Landaj Asocioj. La rezultoj troveblas kaj konsulteblas en la retejo <aktivulo.net>. En la tradicia Jarlibro, la tuteco de informoj pri difinita lando troviĝis en ok lokoj. En la reta versio, ĉio troveblas unuloke. Fine de 2020 estis ĝisdatigitaj la datumoj pri Azio, Eŭropo kaj MONA (Meza Oriento kaj Norda Afriko). Komence de 2021, ni eklaboras pri nova regiono, por enpreni la ĝis nun ekskluditajn landojn Aŭstralio, Nov-Zelando, Kanado kaj Usono. La regiono nomiĝos Pacifiko. Post tio, sekvos la aktualigo de la partoj pri Afriko kaj Latinameriko.

LA PLUSO: Ni urĝe bezonas pli da instruistoj en la movado kaj la komunumo. La Fondaĵo Canuto staras preta membrigi homojn kun transpagaj problemoj. De jaroj ĝi aparte zorgas pri membrigo de virinoj kaj





junuloj. Al tiu prioritato, ni devas aldoni instruistojn. Tio spegulas diraĵon, kiun mi aŭdis en Afriko, kiu ja validas por multaj mondpartoj: „Ĉe ni ĉiu esperantisto devas rapide fariĝi instruisto”. Do, sendu al mi proponojn por membrigo de instruistoj. Mi informos vin pri la necesaj informoj por realigi la membrecon.

LA PANDEMIO: ILEI spektakle adaptis sin al la pandemia realeco. La virtuala kongreso VEKI atestas tion. Kredeble tra 2021 ĝi devos daŭrigi tion. Krome ĝi havas mision peri informojn pri la evoluo de la pandemio, plenumbla partnere kun UMEA, kun kiu ILEI* delonge kunlaboras.

Ni kongresumos en Benino de la 7-a ĝis la 14-a de aŭgusto 2021

Ni devas forlasi la ideon kongresumi en Edinburgo

Eksciinte pri UK en Belfasto, la Estraro de ILEI esploris en Irlando kaj finfine trovis samideanon en Edinburgo. La preparlaboroj komenciĝis. Kiel estrarano Unika laboris por prepari nian Kongreson en tiu skota urbo. Ŝi renkontis tie malfacilaĵojn. La Loka Kongresa Komitato fakte konsistis el nur unu persono, diligenta kaj afabla viro: Ed Robertson. La kongresejo trovita estas la kvakera domo, kiu tamen estus je nia dispono nur ekde lundo matene. Malmendo multekosta kaj postulata jam en majo. Mankas malmultekostaj hoteloj proksime, mankas granda salono por niaj sabataj kaj dimanĉaj programeroj. Devis esti simpozio en kunlaboro kun la grupo de profesoroj kaj esploristoj en la universitato de St Andrews; ĝis nun neniu firma decido pri kunlaboro.

La pandemio malfaciligas ian preparlaboron

Alia malfacila aspekto estas la pandemio. Pro ĝi en la kvakera domo en Edinburgo rajtas sidi nur kvar personoj en salono kun 40 sidlokoj. Plie kiel ni povis konstati, ekde la komenco de la pandemio NENIU POVAS ION PLANI. Por organizi kongreson, ni devas plani... Kiel aspektos Edinburgo en julio, neniu povas diri. Pro tio la Estraro en sia kunsido de la 8-a de januaro aludis al... nuligo... aŭ esploro pri nova loko... Ĉu en Eŭropo aliloke? Ne, ĉar la pandemio skuas la tutan Eŭropon.





La solvo: nova loko. Estu Kotonuo, Benino

Nova solvo, decido, kiu aperis en plia estrarkunsido la 12-an de januaro: Ni kongresumos en **Kotonuo, Benino**.



Novaj datoj: **ekde la 7-a ĝis 14-a de aŭgusto 2021**

La fizika renkontiĝo en la hotelo JoCa kun esperantista etoso kaj agrabla kunvivado, kaj virtuala evento por interesatoj en la tuta mondo. Do temas pri hibrida evento. Privas Tchikpe prezidos la LKK-n. Mirejo Grosjean laboros kiel membro de LKK. Aliaj esperantistoj loĝas en Kotonuo, ni kontaktos ilin, ĉefe junulojn. Unika pretas lertigi du el ili, por ke ili povu zorgi pri filmado kaj dissendado de la fizikaj kunvenoj en Kotonuo.



Fino de SEminario por VIrinoj en la korto de JoCa

Dutaga simpozio

Planata estas dutaga simpozio kadre de la Kongreso. Respondekos la estrarano Radojica PETROVIĆ kunlabore kun la Universitata Laborgrupo de CED/ESF/ILEI. Kunvenigonte ĉeeste kaj neĉeeste esperantistajn kaj nesesperantistajn universitatanojn, la simpozio celas emfazi Esperanton kiel lingvistikan studtemon kaj doni impulson al klerigado per Esperanto.

(Legu pli en la tuj-sekva Simpozia alvoko.)

IPR 21/1 ➤ 30





Novtipa planado de la Kongreso. (Bonvolu atente legi!)

Por efike plani, ni faru tiel: eblaj partoprenontoj **anoncu sian intencon partopreni** ĝis la fino de majo. Tiam, post esploro de la pandemia situacio en Benino kaj analizo de la aliĝanontoj, la Estraro kaj LKK decidis, ĉu vere io okazu en Kotonuo. Do ĝis tiam pripensu, esploru, kalkulu. Malkovru Beninon en www.eo.wikipedia.org, kaj serĉu tie JoCa. Plie en la blogo mirejo2020.blogspot.com de la prezidanto estas ĉapitro kun la nomo Kotonuo, Benino, 2021. <https://mirejo2020.blogspot.com/2021/01/kotonuo-benino-2021.html> Tie vi trovos plej diversajn informojn. La preztabelo aperos tie kaj en la retejo de ILEI www.ilei.info la 16-an de januaro. La anoncoj pri intenco partopreni iru al ILEI per kreota reta dokumento.



Sur la balkono de JoCa en la tria etaĝo

Prezoj (1 EUR = 665 XOF XOF = FCFA loka franko)

Vizo- kaj alven-kostoj

Benino havas retejon por akiri **E-visa**, do elektronikan vizon. El iu loko en la mondo eblas akiri vizon ene de 48 horoj.

Vizo por unu monato: 50 EUR

Deviga kronvira testo ĉe la alveno: 80 EUR





Kongreskotizo (ĝi kovras la ĝeneralajn kostojn): A-landanoj: 100 EUR, B-landanoj: 80 EUR, C-landanoj: 60 EUR.

Ĉambroj (prezoj en XOF/EUR)

Unu persono pagas por 1 nokto 8000/12 por unu ĉambro kun ventumilo.
Por 7 noktoj 56 000/84

Unu persono pagas por 1 nokto 16 000/24 por unu ĉambro kun ventumilo kaj klimatizilo. Por 7 noktoj 12 000/168

Unu persono pagas por 1 nokto 20 000/30 por unu VIP-ĉambro kun ventumilo, klimatizilo kaj fridujo. Por 7 noktoj 140 000/210.

Manĝoj: Unu tago, tri manĝoj kostas 6000/9. 7 tagoj kostas 42 000/63.

Konsideroj pri loko de kongreso

Okaze de la anonco pri la nova loko por la 54-a ILEI-Kongreso 2021 venis interesa sugesto: en ĉiu jaro estu grava kongreso en ĉiu kontinento. Do estu ekzemple UK en Ameriko, ILEI en Afriko, SAT en Eŭropo kaj Azio havu sian azian kongreson. Tamen la afero estas pli komplika.

Ni vidu la aspekton de la **loko**.

Pri la loko ni devas atenti, ke, se eblas, la ekstereŭropanoj devus akiri nur unu vizon kaj ne du, se ili volas partopreni en UK kaj en ILEI-Kongreso.

Pri la loko ni devas atenti pri la distanco: Ostende kaj Lille estis bona solvo, grupo povis salti de Ostende al Lille per buso.

ILEI-anoj povis salti per buso el Pusano al Seulo en 2017. Alia solvo estas, ke la du eventoj estu en complete malsamaj lokoj, kiel estis en 2008: UK en Roterdamo kaj ILEI en Porto Novo. Same en 2019 kun ILEI en Serbio kaj UK en Finnlando.

Se la du gravaj eventoj okazas en la sama lando, povas esti, ke la lokaj esperantistoj laciĝos post la unua semajno kaj penos tiri la duan...

Estas ankaŭ la aspekto de la **datoj**, ke ni sukcesu **eviti koliziojn**.

En 2021 okazontus kolizio inter SES kaj ILEI, SES estas tre fama Somera Esperanto-Studumo, Kursaro en Slovakio ĉefe. Sed ŝanĝante la lokon ILEI decidis pro tio ankaŭ ŝanĝi la datojn kaj saltis al aŭgusto post la UK.

La organizantoj devas konsideri la **forton de la loka movado**, kiu devas kreskigi LKK-n viglan kaj laboreman.





Ni devas konsideri la **prezojn** kaj trovi lokon kun kongresejo kaj hoteloj ne tro multekostaj, kun nuligokostoj ne tro postulemaj...



Ni devas **eviti landojn** kun politikaj problemoj, maltrankvila situacio, elektadoj.... Ni devas eviti landon kiel Usono, kiu ne akceptas multajn personojn el listo de landoj sur sian teritorion... Kelkaj landoj havas leĝojn, kiuj malebligis eventojn kiel niaj kongresoj, do povas esti, ke ni estas ne bonvenaj en diversaj lokoj....

Do la decido estas ne facila, kaj la diversaj movadaj instancoj devas **kunlabore** esplori kaj diskuti por atingi praktikan solvon, kaj tio okazas jam; foje la solvo montriĝas el diversaj faktoroj kaj subite aperas pozitiva kaj praktika loko. Tio okazis por ILEI dum la kunsido de la 12-a de januaro: La demando estis: „Kie estas loko sen pandemio?” En kiu lando sur la Tero ni povus esti grupo en familia formo, babili kune, ĝui la internacian kongresan etoson senbride? Mia respondo estis: Benino, kie mi vivas ekde oktobro 2020. Tie ni jam organizis en Kotonuo la kvinan Afrikan Kongreson en 2013 kun 60 homoj, ni konas la eblojn, la homojn. Do Kotonuo povis





aperi kiel LA solvo en tia urĝa situacio, eĉ se ILEI jam havis sian konferencon en Benino en 2008. Mi aparte ĝojas, ke diversaj afrikanoj el aliaj landoj reagis pozitive al nia anonco de la 13-a de januaro matene, eĉ se ili povus bedaŭri, ke ILEI ne venas al ilia lando. Mi esperas, ke pluraj el ili povos veni al Kotonuo per subteno de aliaj samideanoj. Por togolandanoj ekzemple la vojaĝo ne estas longa. Jam unu persono el Niĝerio skribis entuziasme; li venis al la kvina Afrika Kongreso per 12-hora busveturado... Ĉu li revenos al Benino?

Do ni atendas vin en Kotonuo la 7-an de aŭgusto por suna semajno kaj afrika etoso.

Kiel decidite kaj promesite, la 54-a Kongreso de ILEI estos hibrida, do virtuala evento okazos samtempe.

Simpozia alvoko

Esperanto – studkampo kaj komunikilo en multlingvaj lernkomunumoj

Ĉu Esperanto estas studobjekto de lingvistiko? Ĉu (neesperantistaj) lingvistoj rekonas Esperanton studinda fenomeno? Ĉu interligvistiko apartenas al lingvistiko, aŭ staras apude? Jen demandoj kun eblaj variaj respondoj inter plena agnosko kaj subteno, kaj absoluta neo kaj malakcepto de Esperanto kaj aliaj planlingvoj kiel konsiderindaj realaĵoj.

ILEI sekvas praktikan aliron al tiuj demandoj: demonstri en realaj cirkonstancoj la komunikan kaj pedagogian valoron de Esperanto kiel lingvistika kaj socia fenomeno kaj aŭtentika esplorkampo. La ILEI-simpozioj servas al tiu celo kunvenigante esperantistajn kaj neesperantistajn fakulojn por dialogigi ilin pri temoj de komuna intereso ligitaj al la ekzisto kaj funkciado de la plej sukcesinta internacia planlingvo.





La Universitata Laborgrupo⁸, en kiu ILEI aktive partoprenas, diskutis en la lastaj pli ol du jaroj la lokon kaj rolon de Esperanto en la universitata edukado, iniciatis kaj plu gvidas tiurilatajn projektojn. Dume kaj sinergie Irana Esperanto-Asocio (IREA) organizis retkunvenojn per Zoom por „Kunpens(ig)ado pri Esperanto en universitatoj”⁹. La kunvenoj okazas ĉiumonate gvidate de prof- Renato Corsetti, la 12-a okazis komence de januaro 2021. Gvidmotivo de la kunpensado estas *De Internaciaj Korespondaj Esperanto-Universitatoj ĝis Internaciaj Virtualaj Esperanto-Universitatoj*.

Ĉio ĉi motivis la ILEI-estraron formuli la simpoziajn temon kaj subtemojn jene:

Esperanto – studkampo kaj komunikilo en multlingvaj lernkomunumoj

- Komunikado en multlingvaj lernkomunumoj - problemoj kaj solvoj
- Esperanto kiel lingvistika eksperimento - mitoj kaj faktoj
- Utiloj kaj defioj de neĉeesta lernado kaj instruado
- Survoje al virtuala Esperanto-universitato - spertoj kaj perspektivoj

La simpozio estas planata hibride, kun ĉeesta kaj neĉeesta partoprenoj la 12-an kaj 13-an de aŭgusto 2021 (jaŭdon kaj vendredon en la ILEI-kongresa semajno). La ĉeesta okazos en Kotonuo, Benino, kaj la neĉeesta per Zoom kun la teknika subteno de IREA. La Universitata Laborgrupo program-organize partoprenas en la preparoj kaj realigo de la simpozio. La simpoziaj prelegoj kaj diskutoj estos filmitaj kaj atingeblaj rete post la simpozio. Ankaŭ estos eldonita simpozia resumaro kun biografiaj notoj pri la aŭtoroj.

Se la simpozio vekas vian intereson kaj/aŭ vi deziras prezenti viajn esplorrezultojn, planojn kaj projektojn sur tereno de la simpozia temo, la organiza teamo elkore invitas vin proponi vian kontribuon, aŭ sendi viajn demandojn kaj sugestojn. Precipe estos bonvene se vi kuraĝigos kaj partoprenigos viajn gekolegojn neesperantistajn kiuj povas kontribui al la simpoziaj celoj. Ĉiuokaze bonvolu skribi al la subskribinto de ĉi tiu alvoko. Pliaj informoj venados tra komunikkanaloj de Esperantujo. Dankon se vi pludiskonis ilin en via medio.

Radojica PETROVIĆ <radojica.petrovic.rs@gmail.com>

⁸ https://www.ilei.info/agado/universitata_agado.php

⁹ <https://www.espero.ir/eo/category/kunpensigado/>





INFORMOJ PRI ILEI

Laborkomisionoj

Ekzamena: Karine Arakelian (prez.), Mireille Grosjean (vicprez.), Mónica Molnár, Giridhar Rao, Jérémie Sabiyumva, Han Zuwu.
Elekta: Aurora Bute (gvid.), Zsófia Kóródy, Aristophio Alves Filho.
Kontrolo: Simon Smits, Orlando Raola.
Lerneja: Julian Hernández, Jennifer Bishop, Ronald Glossop, Marija Jerković, Luigia Madella, Ermanno Tarracchini, Mihai Trifoi.
Regulara: Marija Belošević, Rob Moerbeek, Stefan MacGill. Estrare: M. Grosjean.
Terminara: Miroslav Malovec, Ilona Koutny. Estrare: Mireille Grosjean.
Universitata: Duncan Charters (gvid.), Renato Corsetti, Gong Xiaofeng „Arko”, Goro Kimura, Ilona Koutny, Katalin Kováts, Radojica Petrović, Kristin Tytgat, Vicente Manzano-Arrondo. Estrare: Ivan Colling.

Enmovadaj partneroj (entute 14)

E@I (*Edukado ĉe Interreto*): Vít'azná 840/67A, SK-958 04 Partizánske, Slovakio, info@ikso.net. Tel: (+421) 902 203 369. Retejo: <http://www.ikso.net/eo/>.
Fondaĵo edukado.net - funkciiganta la paĝaron de instruistoj, instruantoj kaj memlernantoj. Direktoro: **Katalin Kováts**, Spaarwaterstraat 74, NL-2593 RP, Den Haag, Nederlando. Retadreso: redaktanto@edukado.net.
ICH (Interkultura Centro Herzberg): Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz, (+49) 55215983, Trejnsesioj, metodikaj kursoj, pedagogia fakbiblioteko, internaciaj ekzamenoj, kontaktpersono: **Zsófia Kóródy**, zsofia.korody@esperanto.de.
IFEF (Internacia Fervojista Esperanto-Federacio): *vd. la retpaĝon de UEA*
TEJO (<http://www.tejo.org/>): Observanto de ILEI ĉe TEJO: **Unika (Yuro Jung)**. Observanto de TEJO ĉe ILEI: **Karina Oliveira**.
UEA: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando, www.uea.org. Observanto de ILEI ĉe UEA: **Mireille Grosjean**. Observanto de UEA ĉe ILEI: **Duncan Charters**.

kaj aliaj

Ekstermovadaj partneroj (entute 8)

ALTE (*Asocio de lingvaj testistoj de Eŭropo*) Repr. de ILEI: **Zsófia Kóródy**.
FIPLV (*Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj*): Repr. de ILEI: **Mireille Grosjean**.
UN (kun statuso de observanto): komisiitoj de ILEI: **Rob Moerbeek, Ron Glossop, Leysester Miro**.
Unesko (kun statuso de observanto): Reprezentantoj de ILEI: **Monique Arnaud** (ĉefdelegito), Ecole Chemin de l'Espéranto, Les Pelloux, FR-05500 Benevent et Charbillac, monique.arnaud@aliceadsl.fr, **Martine Demouy, Max Demouy, Jesper Jakobsen, Josiane Moirand**

kaj aliaj

IPR 21/1 ➤ 36





Membreco kaj pagado por diversaj servoj

Membreco kostas 25 € en A-landoj (laŭ la malnova UEA-difino), **12,50 € en B-landoj kaj 2 € en C-landoj**, kun ricevo de 4 numeroj de *IPR* jare. Kun aliro nur al la reta versio de *IPR* membreco kostas 12,50 € por la A-landoj, 6,25 € por la B-landoj kaj 1 € por C-landoj. Supera membro estas tiu ILEI-membro, kiu mendas paperan *IPR* kaj paperan *Juna Amiko* (JA). Tio kostas por A-landanoj 40 € kaj por B-landanoj 22,50 €. Abono de JA papera kostas 18 € en A-lando, 13 € en B-lando. Abono de JA reta kostas 11 € en A-lando, 7 € en B-lando. Bonvenaj estas donacoj al la kaso de ILEI kaj al la fondaĵoj de ILEI. Sekciestroj en trideko da landoj akceptas kotizojn kaj donacojn; simile, perantoj por JA akceptas abonojn enlande. Por informi pri viaj pagoj, bonvole skribu al Vilĉjo (Bill) HARRIS, 4 Edgecomb Ct, Portland ME 04013, Usono. <ilei.kasisto@gmail.com>. Bv klare indiki la celon de via pago. La pagoj por ILEI povas okazi a) pere de la nederlanda ILEI-banko aŭ b) pere de la ILEI-konto ĉe UEA. Jen detaloj:

a) Pagoj al la nederlanda banko de ILEI: numero 4676855 ĉe ING Bank N.V., IBAN NL55INGB 0004676855, BIC INGBNL2A. Bonvolu aldoni 5 € por la nederlandaj bankokostoj pagante el ekster EEA (Eŭropa Ekonomia Areo) kaj EU.

b) Pagoj al la konto de ILEI ĉe UEA: Por pagi al UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL 3015 BJ Rotterdam, bv uzi: ING Bank, Postbus 1800. NL-1000 BV Amsterdam (konto: 37 89 64; IBAN: NL72INGB0000378964; BIC/SWIFT: INGBNL2A). Bonvolu aldoni € 5 por la nederlandaj bankokostoj. Indiku vian nomon kaj vian landon, la celon de via pago kaj la konton de ILEI ĉe UEA: ilek-a. Ĝiri monon el via UEA-konto al ILEI-konto ĉe UEA estas facila ago.

* Simpla abono de *IPR* sen membreco: 30 €. Reklamtarifoj por *IPR*: 180 € por plena, 110 € por duona, 70 € por kvarona paĝo. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon; kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.

* ILEI estas jure registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Den Haag (NL) sub numero 27181064 kun sidejo ĉe la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo (NL).

* Retpaĝo de ILEI: <http://www.ilei.info>.

REDAKCIAJ INFORMOJ

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): Marc CUFFEZ, *Elisabethlaan 295, BE-8400 Oostende*. **Teknika helpo**: Stano MARČEK. **Presado**: Alfaprint, Martin, Slovakio. **Redaktoro**: NÉMETH József, *Fő u. 41/5, HU-8531 IHÁSZ, Hungario*, jozsef.nemeth@gmail.com, www.ilei.info/ipr/; tel: (+36-70) 931-0530.

Peranto de ILEI kadre de LIBE (Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj): Olena Poshivana, amatalena@ukr.net. La revuo estas rete aŭskultebla por vid-handikapuloj. Informas: Rob MOERBEEK, *Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE BEVERWIJK, Nederlando*, moerbeekr@gmail.com.

**Ni fermis la nunan numeron la 15-an de januaro 2021,
redaktofino por la sekva numero: la 15-an de aprilo 2021.**





SEKCIOJ DE ILEI

Albanio: Bardhyl SELIMI,
Rruga Fortuzi, nd.9, h.1, ap. 3,
AL-1016 Tirana,
bselimi@gmail.com

Armenio: Lida ELBAKJAN,
Moldovakan 26/2, kv.52, AM-
375062 Erevan,
Lidaelb@yahoo.com

Aŭstralio / Nov-Zelando:
Penelope VOS, Eastern Region
Communications Rotary
Australia World Community
Services Ltd (RAWCS),
comms.eastern@rawcs.org.au

Barato: Arikapalli Giridhar
RAO, E 14 Good Earth Malhar
Mosaic, Kambipura, Kengeri
Hobli, Bengaluru 560060, India,
rao.giridhar@apu.edu.in

Belgio: Marc CUFFEZ,
Elisabethlaan 295,
BE-8400 Oostende,
flandrio@hotmail.be

Benino: ALOFA Jérôme
Charles, 04BP0672
BJ-Cotonou, Rep du Benin,
alofkarlo@yahoo.fr

Brazilo: Aristophio Andrade
ALVES FILHO,
Rua B-55, N° 85, Conj. B.
Bentes 1, Q. B-55, Benedito
Bentes, Maceió, AL, Brasil, BR-
57085-748,
esperantomaceio@yahoo.com.br

Bulgario: Mariana
GENCHEVA, Targovska 95,
BG-5180 Polski Trambesh,
maries972@yahoo.com

Burundo: Evariste
BIGIRIMANA, BP 170, BI-
Rumonge-Burundi,
bigevariste@gmail.com

Ĉeĥio: Jana
MELICHÁRKOVÁ, U Hřiště
398, CZ - 696 06 Vacenovice.
melicharkova@quick.cz

Ĉinio: WEI Yubin „Jado”
Baiyangshujie Xiaoxue, Taiyuan
Shanxi, CN-030003,
ilei_cxinio@163.com

Danio: Ileana SCHRØDER,
Vestavej 4, DK-2770 Kastrup,
ileana.schroder@mail.dk

Francio: Michel DECHY, 65
allée de la Crémaillère,
FR-59650 Villeneuve d'Ascq,
michel_dechy@hotmail.com

Germanio: Zsófia KÖRÖDY,
Esperanto-Centro,
Grubenhagenstr. 6,
DE-37412 Herzberg/Harz,
zsafia.korody@esperanto.de

Hispanio: Luis Eduardo
BERDOR REMON, Pablo
Iglesias 41, 4 B,
ES-50018 Zaragoza,
eduardo.berdor@gmail.com

Hungario: József NÉMETH,
Fő u. 41/5, HU-8531 Ihász,
jozefo.nemeth@gmail.com

Irano: Ahmad Reza
MAMDUHI, Nr. 9 K. Iraj, Kh.
Dowlatshad Gharbi, Kh. Farid-
Afshar, Kh. Vahid Dastgerdi,
IR-19166-13514 Tehran,
mamduhi@gmail.com

Italio: Luigia OBERRAUCH
MADELLA, via Prampolini 8,
IT-43122 Parma,
esperoeparmo2020@yahoo.com

Japanio: ISIKAWA Tiekō,
Tate 1-6-6-103, JP-353-0006
Siki-si, Saitama-ken,
tiekosanjo_103@bj8.so-net.ne.jp

Katalunio: Rubén
FERNÁNDEZ ASENSIO.
C/ Latrilla 12, 1r 2a, ES-08912
Badalona, ileicat@hotmail.com

Kongo DR: MAFUILA
MAVOMO Jackson,
C/O DKEA, BP 1007 Kin
Limete Congo RDC,
mavomespero@gmail.com

Korea Resp.: PARK
Yongsung, 402-dong 1803-ho,
Hansol-Solpark Apt. 218
Samkye-ro, Gimhae-si,
Gyeongsangnam-do, KR-50887,
esabpark@korea.com

Kroatio/KEL: Marija
JERKOVIĆ, Jarunska 6,
HR-10000 Zagreb,
mjerkovic@net.hr

Kroatio/KEU: Svijetlana
AKIK, Franje Malnara 52,
HR-10000 Zagreb,
ilei@hes-keu.hr

Kubo: Magaly MOLINA
SUÁREZ, Reyes 390 Apto.10 e/
Pocito y Luz, Lawton. 10 de
Octubre, La Habana. Cuba
yunairamm@infomed.sld.cu

Meksiko: Carlos
HERNÁNDEZ LOARCA, Arco
del Triunfo 2019-40 San Pedrito
los Arcos,
MX-76148 Querétaro México,
ilei@esperanto-mexico.org

Mongolio: Khorloo
TSERENDEJID, MN-
Ulaanbaatar bayangol district,
khoroo 24, 42-1-62,
tserenjd@yahoo.com

Nederlando: Robert
MOERBEEK,
Zwaansmeerstraat 48,
NL-1946 AE Beverwijk,
moerbeekr@gmail.com

Nepalo: Bharat Kumar
GHIMIRE, Nepala Esperanto-
Asocio, G.P.O. Box 10518,
Kathmandu,
nespa_bharat@hotmail.com

Pollando: Magdalena
TATARA, ul. Grzegórzecka
74/4, PL-31-559 Kraków,
mtatara@gmail.com

Rumanio: Mihai TRIFOI, Str.
Principală, Bl.1 Ap.3, RO-
527116 Bixad/Jud. Covasna,
mihaitrifo@yahoo.com

Senegalo: Assane FAYE, BP
1186 Rufisque, Senegal,
damanemanu2000@yahoo.fr

Per viaj donacoj vi povas
subteni la agadon de la
Ligo. La UEA-konto de
ILEI estas ilek-a.





Serbio: Radojica PETROVIĆ, Bul. oslobodjenja 36, RS-32000 Čačak, radojica.petrovic.rs@gmail.com

Suda Afriko: Emile MALANDA NIANGA, PO BOX 2787 ZA-Cape Town, emalandan@yahoo.fr

Svedio: Agneta EMANUELSSON, Carl Ugglas väg 6, SE-641 37 Karltrineholm, agneta.emanuelsson@fro.se

Svislando: Charles RODUIT, rue de Chancheri 1, CH-1661 Le Piquier, charles.eo@roduit.info

Tanzanio: Mulele Samwel MBASSA, Box 25, Bunda - Tanzanio. Poŝtel: +255786 819 767, +255758 176 722, mulelembassa@gmail.com

Togolando: ATTIOGBE-AGBEMADON B., Mensah, B.P. 39, Aneho, TG-Lomé, abiovamensah@yahoo.fr

Ukrainio: Nina DANYLYUK, pr. Sobornosti, 32, Log. 108 UA-43026 U. Lucjk, nina_daniljuk@ukr.net

Usono kaj Kanado: William B. HARRIS, 4 Edgecomb Ct, Portland ME 04013 USA, wb_harris@hotmail.com

Vjetnamio: Ngyuyen THI NEP, 70, B20A, Kim Lien, Dong Ha, VN-Hanoi, Ngyuennepa9cfl@gmail.com

REPREZENTANTOJ

Britio: Elizabeth STANLEY, Frome House, Frome Gardens, Stroud, Glos. GL5 4LE, UK, elistaros@hotmail.com

Ĉilio: Héctor CAMPOS GREZ, Casilla 903, CL-3340000 Curico, hccg@uea.org

Ganao: Alfred Kobina ARTHUR, P.O. Box TS 404, Teshie, GH-Accra, ctrgh@gmail.com

Islando: Loftur MELBERG Sigurjónsson, Traðarberg 13, IS-221 Hafnarfjörður, lofturmsig@yahoo.de

Israelo: Luiza CAROL, str. Bnei Binyamin 53, apt 12, Netanya IL-4201997, luizacarol1947@gmail.com

Niĝerlando: BOUKARI Ellias Illiasou, S/C de Kanguéy BP11936 Niamey, Niger, elliadsj@gmail.com

Pakistano: Adeel Mahmood BUTT, Ward No. 11, near M.C. High School, PK-39100 Nankana Sahib, adeelbutt84@gmail.com

Rusio: Svetlana SMETANINA, 141850 d. Celeevo, Dmitrov-regiono, d.4A, kv.201 Moskovskaja oblast, svsmetanina@yandex.ru

Tajvano: Reza KHEIRKHAH, Chung Ching Road, No. 105, TW-Pingtung city, 900-73, rezamenhof@yahoo.com

Urugvajo: Sonia RISSO, Pascual Costa 3253 Apto 1215, UY-11700 Montevideo, sonry@adinet.com.uy

KONTAKTPERSONOJ

Argentino: Gabriel Enrique WAGNER, Misiones 1421, AR-3116 Crespo - Entre Rios, gwagner@digitaloffice.com.ar

Aŭstrio: Walter KLAG, Vieno, esperanto@chello.at

Bolivio: Leandro DIA RIOS, Calle María Estiváriz No 290, Avenida Coronel Valdez Pasaje Zaratuŝtra, Villa Pabón, Zona Central, mileis_7@hotmail.com

Bosnio kaj Hercegovino: Nimeta KULENOVIĆ, Branica Sarajeva 15/V, BA-71000 Sarajevo

Finnlando: Sylvia HÄMÄLÄINEN, F.E. Sillanpään katu 2 C 46, FI-33230 Tampere, sylvia.h@kolumbus.fi

Haitio: Christine THEANO, Christ-Roi, Imp. Romane # 41, HT-6110 Port-au-Prince, christinetheano@hotmail.com

Indonezio: Ilia Sumilfia DEWI, Perumahan, Pejuang, Pratama, Blok L, no. 11, RT/RW 003/006, ID-Bekasi, Jawa Barat, ilia.dewi@gmail.com

Kenjo: Gilbert S. SIKALA, Chemomi Estate, P.O. Box 22, 30301, Nandi Hills, simiyugilbert@yahoo.com

Kostariko: Hugo MORA Poltronieri, Apartado 4981, CR-1000 San José, tikoguau@gmail.com

Litovio: Gražina OPULSKIENĖ, Obuoliuko 42, Mažeikiai LT-89312, grazopul@yahoo.com

Luksemburgo: Claude NOURMONT, 2 om Kläppchen, LU-5682 Dalheim, moonmont@pt.lu

Nikaragvo: Uriel GURDIAN, Rpto. Shick 2da etapa, Iglesia adventista 1c O, 1c N. Casa G-32, Managua, Nicaragua, esperantonica@gmail.com

Norvegio: Douglas DRAPER Esperanto, Olaf Schous vei 18, NO-0572 Oslo, oficejo@esperanto.no

Portugaliao: Luís LADEIRA, Rua Manuel Valadares, 10, 2E PT-2650-192 Amadora, luisladeir@gmail.com

Slovenio: Peter GRBEC, Sv. Peter 142, SI-6333 Sv. Peter, peter.grbec@gmail.com

Srilanko: U.L.F.G. Zeiter PERERA, 197, Indivitiya Road, Hettigama, Jaela, Srilanka, zeiter.espero@gmail.com

Tagikio: Firdaus SHUKUROV, Glavpochtamt, a.k. 135 TJ-734000 Dushanbe, komintel@yandex.ru; aet2005@yandex.ru

Turkio: Vasil KADIFELI, Ataturk mah. Turgut Ozal blv. Gardenya 2-1 D:21 Atasehir 34758 Istanbul/Turkey, vasilkadifeli@gmail.com

Venezuelo: Asociación Venezolana de E-o, Jezer DORANTE, Apartado postal 47675, Caracas 1041-A, VE, jezerdorante@gmail.com

La diversaj fondaĵoj de ILEI
aperas tie: www.ilei.info/instancvoj/fondajhoj.php



